

Christian Adolph Overbeck,  
Alvenu Maj' kaj donu

*tradukita de Bernd Hasecke*

Alvenu Maj' kaj donu  
Ekvivon al natur'  
La teron nun florkronu  
Por nia korplezur'!  
Ho, baldaŭ ni respiras  
Odoron de l' viol':  
Tra l' mondo nun vagiras  
Kantante la popol'.

Sendube vintro havas  
Magion eĉ por hom'.  
La neĝo nin tre ravas  
Per ĉarma lum-fantom'.  
Rapide vi glitŝuas  
Sur glata la glaci',  
Glitveturadon ĝuas  
En blanka neĝo ni!

Sed kiam birdoj restas  
Ĉi tie dum somer',  
Kaj ni la lumon festas,  
Trompravas nin ĥimer'.  
Elfloras nun violoj  
En nia suna val',  
Alflugas la kukoloj  
Kaj eĉ la najtingal'.

...

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

*Traduko de la Germana poemo "Komm lieber Mai und mache" de CHRISTIAN ADOLPH OVERBECK (\*1755-08-21 – †1821-03-09) en Esperanton de BERND HASECKE (\*1928-12.29 – †2008-02-05).*

*Arg-1000-2023 (2014-05-03 17:56:22)*

*Esperantigis: Bernd Hasecke (\*29.12.1928; Kirchstr. 17c, D-42553 Velbert, Germanio). S-ro Bernd Hasecke estis delegito de UEA. Li mortis la 5-an de Februaro 2008 laŭ reta informo de lia filo Jan Ulrich Hasecke, Schubertstr. 4, D-42791 Solingen, Germanio.*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2008-03 tiun tradukon de s-ano Anton Kronshage, Eulenberg 27, D-58332 Schwelm, Germanio, tel. 0049-(0)2336-12091.*